

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—, fremdlando: bonvaluta Kĉ 25.— (5 sv. fr.) malbonvaluta Kĉ 15.— (3 sv. fr.) Konto de la ĉekoficejo Praha n-ro 34.271.

SUR LA NOVA VOJO ...

Hodiaŭ ni volas paroli iom pri ni mem, kvankam el la unua kaj la dua numeroj la leganto povas jam havi ian bildon pri la enhavo, tendenco kaj aranĝo de la nova Progreso.

Do, sur niaj literaturaj paĝoj ni dezirus vidi ne sole tradukojn el la ĉeĥa literaturo. La pli granda parto de niaj legantoj deziras trovi en sia nacia gazeto esperanta ankaŭ montrojn de fremdaj literaturoj, interesajn por ili ankaŭ laŭ la lingva vidpunkto. Ni invitas do fremdlandajn samideanojn, ekz. membrojn de E. L. A. uzi la okazon por konatigi sian literaturon inter la ĉeĥaj samideanoj.

Oni diskutu kiel ajn pri la neceso de naciaj gazetoj esp., oni ne povas nei ilian funkcion de lingva edukilo kaj perfektigilo, precipe tie, kie ne ekzistas lernolibroj pli detalaj kaj sufiĉe atentantaj specialaĵojn de la nacia lingvo kaj kie la sola plej detala vortaro esp. aperis antaŭ 15 jaroj. En nia Lingva Fako ni zorgos, ke la legantoj trovu ĉion ĝis nun vane serĉatan.

La rubriko El scienco konatigos la leganton almenaŭ kun tiuj fakaj esprimoj, kiujn ĉiu estras en sia gepatra lingvo. Koni funde esperanton signifas ja scii esprimi en ĝi ĉion, kion oni kapablas diri en sia lingvo gepatra.

Dum la laboraj kunsidoj de diversaj distriktoj de nia lando ni spertis, kiom mal multe niaj membroj estas informitaj pri gravaj aferoj de nia movado, pri ĝia literaturo k. s. En formo konciza, supervida ni planas prezentadi ĉion sciindan.

Nova Eŭropo centra kaj orienta ankorau longe restos malmulte konata al la ceteraj,

eĉ inter si mem. Ni ne vidas ion kontraŭan al la idealo de internacia harmonio laborante por pli bona kono reciproka kaj akcentante ĉion, kio la popolojn pli kunigas ol dividas. Ebleco diskonigadi la vivon de la malgrandaj nacioj estas unu el tre bonaj argumentoj propagandaj por esperanto, kiu mankas al la samideanoj de grandaj nacioj, sed kiu ĉe la allaj efikas tre sukcese.

Jen koncize la ĉefaj punktoj de nia programo, pri kiu ni intence ne parolis en la unua numero. Ĝi trovis viglan konsenton kaj aprobon ĉe multaj samideanoj. La multenombra kunlaborantaro garantias, ke la plano ne restos sole promeso. Plue, ni ĉiam volonte aŭskultos opiniojn de aliaj.

Kiu konas la forton de la esperanta movado en nia lando, facile komprenos nian esperon, ke la gazeto — larĝe kontentiganta dezirojn de niaj samideanoj — trovos ĉe ili ankaŭ financan subtenon kaj estos abonata. La sperto de la unua monato plene pravigas tiun ĉi esperon. Kaj al tiuj kiuj jam tro multe oferas por la movado aŭ kiuj tute ne ŝatas ion oferi al ĝi, ni memorigas: Ne forgesu, ke la idea movado troviĝanta ĉiam ankoraŭ en siaj infanaj jaroj bezonas oferojn; fruktoj venos poste kaj eble eĉ ne apartenos al ni. Nia tasko estas „semi kaj semi, semi konstante, pri tempoj e s t o n t a j p e n s a n t e.“

R. H.

La venonta numero aperos la 20 januaro kaj estos sendita, krom al abonintoj, al ĉiu kiu ne resendis la unuajn du n-rojn. Ni lin opinios abononto kaj atentigas pri Administracia komuniko sur p. 10.

LITERATURO

JAN VRBA :

KRISTNASKA ARBETO

El „Libro el la naturo“, trad. K. Procházka.

Post tre multa konsiderado Georĉjo fine ekkuraĝis kaj sin pretigis por danĝera vojaĝo. Sola kaj sola, ĉar li en sia infana koro elsentis, ke estas bezone iom da heroeo, por ke la afero sukcesu. Komprenoble, li ankoraŭ nun timis, terure timis, paŝetante tra la regiono, kiu estis ŝutkovrita de alta neĝo, al la malproksima arbaro, malhele bluanta, malantaŭ vastaĵoj de la blankegaj kampoj, en sunbrilo fajrerantaj de multego da gemetoj.

Sed li neniel volis permesi, ke denove ripetigu la lastjara kaj la antaŭlastjara ĉagrena historio. Nu jes, jam dufoje ne venis al ili Jesueto — li forgesis pri ili kaj donacis al ili nenion. Li ĉiufoje tre malĝojis, kaj la fratineto, ankoraŭ pli malgranda ol li, eĉ ekploris... Li ne estis multe certa, ĉu ili ne kolerigis per io Jesueton — ĉar oni estas tiel malsaĝa, kiam oni estas juna, kaj kvankam oni jam vizitita la unuan klason de elementa lernejo, oni ankoraŭ ne scias tre multajn aferojn... Tial li intime, sed insiste demandis la panjon.

Ŝi iel ektimis, kaŭriĝis sur la malalta piedbenketo kaj altiris lin al si inter la genuojn. Poste ŝi diris, ke Jesueto ĉe ili ne haltis pro tio, ke li ne vidis apud la fenestro kristnaskan arbeton, ĉar li opinias, ke tie, kie ĝi ne estas preparita, oni ne deziras lian donacemon... Pli frue alportadis la arbeton el arbaro ĉiam la paĉjo. Sed li foriris militservi — kaj ŝi ne havis tempon alporti ĝin. Ŝi devis iri labori, zorgi, ke oni havu ion por manĝi — kaj tiel ĝi okazis...

La malgranda Georĉjo komprenis kaj kaj lia mieno nubigis, ĉar li opiniis, ke ĉion ĉi tion devus Jesueto scii jam longe! Tamen li kontentiĝis per la klarigo kaj diris nenion plu.

Malrapide forpasis la jaro, proksimiĝis denove la kristnasko, sed la paĉjo ankoraŭ ne estis revenanta de la milito. Pasadis serio da lastaj tagoj, kaj en ili la malgranda Georĉjo batalis interne pri grava decido. Li mem estus jam pro timo rezigninta je donacoj de Jesueto, sed li ne volis, ke la fratineto refoje ploru, kiel la pasintan jaron... kaj kiam ŝi matene en lia ĉeesto

demandis la panjon, ĉu hodiaŭ irados Jesueto, li venkis en sia timoplena koro la lastan ekvibron de malkuraĝo — kaj firme decidiĝis, ke li posttagmeze ekiros en la arbaron kaj la arbeton nepre alportos, por ke tiu malfeliĉa afero ne ripetigu...

Baldaŭ post la tagmezo li elŝteligis el la domo kaj paŝetis nun tra alta neĝo al arbaro. Sur la kapo li havis vilan ŝafpeltan ĉapon kun orelsirmiloj, sub la mentono ligitaj per galono, sur la kolo ĉirkaŭvolvitajn tukon — kaj manojn profunde enmetitajn en la poŝoj. Liaj piedoj frostis, li tremis de malvarmo, sed li tion ne atentis. Sur la kubuto de lia maldekstra brako balanciĝis mansegileto de la paĉjo, kiun li elesploris en la subtegmento inter amaso de malnova ilaro. Li eĉ sciis, kiel granda devas esti la arbedo. Li surrampis foje posttagmeze, kiam neniu estis hejme, la tablon, stariĝis sur la piedfingroj kaj etendis la manon al la plafono. Jes, ankoraŭ pli alta ĝi povas esti, ol kien li atingas per la mano...

Li iris tra la neĝokovrita regiono kaj miris. Ĉie estis blankaj remparoj kaj sur la arbetaĵoj amaso da neĝtufoj. Sed kiel li ekmiregis en la arbaro! La arbosuproj estis blankaj, de la branĉoj pendis glaciaj konusoj, kaj la trunkoj estis sukeritaj per prujno. Li haltigis la spiron kaj estis al li, kvazaŭ li irus en fabelo. Profunda kaj majesta silento, kiu ĉie etendiĝadis, tuŝis lin nevideble kaj konsternis lin...

Fine li alvenis al juna arbetaro. Tie estis sennombra multego da arbetaĵoj, kaj ĉiuj estis tre bele surŝutitaj per neĝo. Li elektadis longe, multajn arbetaĵojn li amekaresis per rigardo, ĝis fine unu speciale ekplaĉis al li. Li etendis la manon alten, stariĝis sur la piedfingroj kaj forspiris kontente. La arbedo konvenis ankaŭ laŭmezure...

Li genuis en la neĝo al sia elektito, alpremis al la trunketo la segileton — kaj eksegetis. Sed la arbedo havis tre persistan vivon. Georĉjo estis jam tre lacigita kaj ŝvitkovrita, liaj manoj ruĝiĝis de la neĝo kiel kankro — sed la arbedo ankoraŭ rezistis.

Nur post ankoraŭ longa penado ĝi rulfalis sur la vojon...

Sed en la sama momento ekkraketis proksime la neĝo, malantaŭ Georĉjo aŭdiĝis malbena, kaj iu elŝiris el lia mano la segileton. Li ektimis, elsaltis kaj turnis sin — kaj vidis, ke malantaŭ li staras homo kun nigra ĉapo, kiu havis sur la brusto flavan rondan ladeton kaj sur la ŝultro pafilon.

La segileto ekkrakis en liaj manoj — kaj jam ĝi flugis altarke en densaĵon, rompita je duonoj. Poste Georĉjo ricevis kapofrapon, tiel ke li rulfalis en la neĝon. Kiam li levigis kaj kuris al la urbo, fluge sekvis lin ankoraŭ longe insultoj.

Klaketante per la dentoj de timo kaj malvarmo, li fine ĝiskuris en la urbon. Survoje li sennombrafoje puŝfaletis kaj ruliĝis en neĝoblovaĵon, sennombrafoje li deglitis sur glacio kaj de falo li dolorige batvundiĝis. Sed li nenion atentis; re- kaj refoje li levigadis kaj kuris, ĉar lia timo estis pli granda ol la doloro. Nur inter la konstruaĵoj de la urbo li trankviliĝis. Li estis malpurigita sur la vizaĝo, ĉar li disŝmiris sur ĝi ĉiujn larmojn; sed en la urbo li ne ploris plu...

Kiam li estis alveninta hejmen, jam krepuskiĝis, kaj la panjo pri li jam esplordemandis. Ŝi terurigis pro lia stranga aspekto; sed li honeste kaj precize al ŝi diris ĉion kaj ne povis sin deteni, ke li ne ekploru. Li eksciis de ŝi, ke la homo, kiu elpelis lin el la arbaro, estas la ĉasgardisto kaj ke li loĝas en la lasta dometo en la antaŭurbo en la direkto kontraŭ la arbaro. Ĉe la vespermanĝo li ne povis reteni la demandon — kaj tiam li sciigis, ke la gardisto havas malgrandan knabinecon.

Kiam ili estis vespermanĝintaj, kaj la panjo lavis la vazaron, li starigis sin al la fenestro kaj ekrigardis kontraŭ la ĉielo. Brilis tie steletoj kaj ie trans la tegmento lumis la luno. Sed Georĉjo atendis. Li sciis jam longe, ke Jesueto alveturas de l'ĉielo teren sur arĝenta nubeto. Tiun nubeton li atendis...

Fine li ĝisatendis. La nubeto elnaĝis super la tegmento de la kontraŭa garbejo. Georĉjo sciis tuj, ke ĝi estas tiu ĝusta, ĉar ĝi brilis arĝente kaj havis la randojn maldiketajn kvazaŭ el punktoj — ĝi aspektis ĝuste tiel kiel blankaj kusenoj, kiuj estas en la preĝejo sur ambaŭ flankoj de l'altaro.

Apenaŭ la nubeto estis aperinta, Georĉjo sin rapide krucosignis kaj ekpreĝis kun la tuta ardeco, je kiu estis kapabla lia koro. — „Jesueto!“ — li diris, premante la kunmetitajn manojn al la brusto — „mi petas cin, Jesueto, al la knabineco de la gardisto donacu nenion, tute nenion, ĉar lia paĉjo forprenis al mi la arbeton!“ — Kaj li denove sin krucosignis kaj forpaŝis de la fenestro.

(Finota.)

MI VAGADIS EN STELLUMO

Poemo de Marie Heiberg. El la estona lingvo tradukis kaj al sia ĉeĥa amiko M. Lukáš dediĉis Hilda Dresden.

Mi vagadis en stellumo
Sola laŭ vojet'.
Ĉie freŝa neĝ' dormetis.
Sleda jen bruet'!

Ploris koro pro funebro...
Antaŭ mi dekliv'.
Mia voj' trans ĝi kondukis,
Longa kiel viv'.

Mi antaŭen nun rigardis —
Griza horizont'.
Zorgc sur ĉevalo nigra
Rajdis trans la mont'...



LA FESTO DE KRISTNASKO

De Hans Koch, München.

La gaja, ĝojiga Kristfesto sendube estas unu el tiuj ekleziaj festoj, kiuj plej intime eniĝis en la popolanimon. En ĉies koro la penso pri la brilanta Kristarbo vekas nekomprenoble agrablan memoron; plenaguloj ni ĝojas kune kun la entuziasmigitaj infanoj.

Mirinda estas la historio de tiu festo. Ne de komenco ĝi havis la hodiaŭan eklezian aspekton; nur dum la fluo de l'jarcentoj la iama parte idoleca signifo cedis al la nuna.

Atentinda por si mem certe jam estas tio, ke oni festas la tagon de l'naskiĝo de Kristo. Neniam — almenaŭ ĝis la 3a jarcento p. K. — sanktulo iel solenis la tagon de sia naskiĝo, kaj eĉ ankoraŭ nuntempe la katolikoj plejparte ne faras tion.

Efektive tiam oni ne intencis speciale festi tiun tagon; la scienculoj sole sin okupis elkalkuli la daton de la gravaj bibliaj okazintaĵoj. La festo mem havas apartan originon.

Jen estis la gnostikanoj — disciploj de tiu mistera teorio — kiuj ŝatis esprimi la transcendon de siaj festoj per diversaj simboloj. Ili solenis la bapton de Kristo la 6an de januaro. Sed vico da idolecaj tradicioj estis ligita al tiu soleno.

Tiu tago ĝis tiam estis la festo de l'greka dio Dionysos; baldaŭ ĝia kulto kunfandiĝis kun tiu de l'Kristobapto. Tiu nova kulto kreis tiel vastan plaĉon inter la po-



poloj, ke iom post iom ĝi trovis akcepton en la okcidenta eklezio. Per tio kompreneble ĝi suferis kelkian signifoŝanĝon; precipe tial, ke oni disigis ĝin de l'festo Epifanio transmetante ĝin al la 25a de decembro, la tiama jarkomenco. Estas evidente, ke per tio kreskis la signifo de la Kristnaskiĝo.

Certe ankaŭ aliaj faktoj estis motivoj por la simboliko de la Kristfestoj. En la antikvepoko ĝenerala popolmaniero estis nomi la sunon — kiam ĝi estis superinta la plej mallongan tagon — la nova, juna suno, komparante ĝin kun malgranda infano. Tiu tago estis publika festo ĉe preskaŭ ĉiuj antikvaj popoloj. Tial estas kompreneble, ke la saĝaj episkopoj profitis tiun ĉi kutimon kunmetante eklezian feston kun la idola por inklindi tiamaniere la popolon al la nova religio.

Karakteriza faktoro de l'kristnaska festo cetere estas la kristarbo. Ne malpli interesa estas ankaŭ ties historio. Oni konjektas, ke ĝi devenas de la pragermana Jul-soleno. Diversaj ceremonioj, troveblaj en preskaŭ tuta Eŭropo, indikas, ke la brilanta Jul-arbo valoris pratempe kiel simbolo de la renaskiĝanta suno. Tiu ĉi mistera arbo estis la pino aŭ la taksuso — ne la abio, en aliaj lokoj la sorpujo. Al tiu brilanta arbo eble ankaŭ rilatas iu animkulto, simila al nia nuna, per kiu ni honoras la mortintojn per brilantaj lumoj — la festo de la mortintoj.

Tamen estas mirinde, ke la ĝenerala uzo de l'Kristarbo en la hodiaŭa aspekto tre malfrue fariĝis publika. Certan sciigon pri ornamenta Kristarbo ni havas unufoje el la jaro 1605 de Strassburg e. Als. Iam kaj iam izole kronikoj raportas pli ofte pri ĝi. Multaj germanaj regionoj ne ankoraŭ konis la Kristarbon dum la mezo de l'pasinta jarcento, krom eble la grandetaj urboj. En kelkaj izolitaj lokoj eĉ nuntempe ĝi estas ankoraŭ nekonata.

Sed tamen ni povas diri hodiaŭ, ke la festo estas plentute populara kaj eĉ la plej plendinda infano revas pri la brilanta arbo forgesante por kelkaj minutoj la mizeron ĉirkaŭ si.

ĈU VI JAM ALIĜIS AL Ĉ. A. E.?



EL SCIENCO



STAN. KAMARYT:

TEMO DE LA FILOZOFIO

Estas mirinde, ke la filozofoj, kvankam ili dum pli ol du mil jaroj vivas el la filozofio, tamen ne sukcesis en konkordo difini temon de sia scienco. Filozofio estas, laŭ Th. Jouffroy, scienco, kies temo ne estas ĝis nun fiksita. Kaj la diversaj pensuloj diversmaniere ĝin difinis aŭ imagis. Okazis eĉ, ke iuj trovis filozofion tute ne esti scienco kaj okupo inda de pensa laboro. La pensuloj pozitivismaj estas fieraj pri tio, ke ili ne estas filozofoj. La filozofio perdis laŭ ili ĉiun kaŭzon por ekzisti, ĉar ĉiuj problemoj, kiuj povus interesi la homaron, estas nun jam dividitaj inter la diversaj fakaj sciencoj. Ili donas sole partajn respondojn al partaj demandoj, sed tiuj respondoj estas science ekzaktaj kaj tial multe pli ĝojas kaj utilas al la homo ol fantaziaj konceptoj de ia senbaza meditado, kiu volas uzi sciencan esprimmanieron, sed fakte ne estas io pli ol ludo de la fantazio, kiu neniel povas helpi al pli bona ekkono de ia ajn vero. Nenion plu povas sukcese fari la filozofio nun, en epoko de la specialiĝinta sciencaro, ol esti klasiganto de la ceteraj sciencoj. Auguste Comte (1798-1857) estas kreinto de tiu ĉi neado de filozofio. La homo per ekzaktaj sciencoj instruita pri la neebleco ricevi absolutajn nociojn rezignas serĉi originon kaj destinton de la universo kaj koni la plej profundajn kaŭzojn de la fenomenoj por dediĉi sin ekskluzive per meditado kaj observado al serĉado de efektivaj leĝoj naturaj, t. e. rilatoj neŝanĝeblaj de la sinsekvo kaj simileco.

Sed kvankam tiu instruo trovis multan kaj bruan aprobon precipe ĉe la natursciencistoj, tamen ĝi neniel malgrandigis la bezonon kaj ĝuon filozofi. Ĉar ĵupli alta estas progreso de la sciencoj, despli mirinda estas la fakto, ke la scienco estas ebla, ke la subjekto (la primeditanta homo) estas kapabla sistematiĝi siajn perceptaĵojn, ke la mondo povas esti pensata. Serĉi respondon al tiuj demandoj neniam ĉesos la homaro kaj neniam tedos ĝin aŭskulti tiajn respondojn. Kaj neniam ĝi estos kontenta kun tiaj respondoj, eĉ estu ili elpensitaj per la plej sagaca intelekto kaj diri-

taj en la plej plaĉaj vortoj. Tial neniam la filozofio perdos sian kaŭzon de ekzisto kaj eterne ĝi konsolos la homajn korojn, kaj eterne ilin turmentos. Kaj eterne la filozofoj disputos, ĉu ilia temo estas ontologia aŭ fiktiva.

Ĉar filozofio neniam estas sole jesado, el kiu sekvas plezuro kaj ĝojo. En tio ĝi esence diferencas de la religio. La religio respondas je la samaj demandoj kiel la filozofio. Sed dum la religio daŭre scias ĉion, la filozofio estas daŭre skeptiko; dum la religio atendas veron de la revelacio Dia, esperas savon de la supernatura potenco kaj enigas homon en decidojn de la Dia graco, la filozofio volas trovi la veron mem aŭ per meditado aŭ per intuicio, savon esperas de la homara moraleco edukebla kaj volas organizi la homaron tiel, ke la sorto de individuo estu kiom kaj kiel ajn eble pli milda.



KIO ESTAS LABORA EFEKTO DE UNU KILOVATHORO ?

Mi estas konvinkita ke, krom la specialistoj, sole malmultaj scias respondi tiun ĉi demandon klare kaj precize. Ĉiu scias ja bone, kio estas 1 metro, 1 kilogramo, 1 HP (ĉevalforto), sed la kilovathoron, unuon por elektra laborefeto konas sole malgranda parto de nefakuloj. La elektro fariĝis tiel ĉiutaga, ke nur malmultaj admiras ĝiajn fenomenojn, tiom malpli oni pensas pri tio, kio estas kilovathoro.

Mi do volas doni mallongan klarigon, tute popularan. Por la elektra lumigo unu kilovathoro liveras tiom da lumo, kiom 4 litroj da petrolo (supozante uzon de metalfadenaj lampetoj). Se ni volas uzi elektron por ia laboro, ni devas scii, ke la labora rezulto de unu kilovathoro egalas proksimume al 1,1 ĝis 1,2 ĉevalforto. Ankoraŭ pli klara estos al ni la koncepto de unu kilovathoro, se ni atentis la fakton, ke ĝi sufiĉas por la jenaj laboroj: por suprenpuŝi 400 litrojn da akvo 7 metrojn alten; aŭ por elektre plenigi kaj ŝtopi 250 botelojn; aŭ por elektre gladi dum 4 horoj; por purigi 5000 tranĉilojn per elektra aparato aŭ por purigi 75 parojn da ŝuoj. La laborkvanto de unu kilovathoro sufiĉas por funkciigi hejman motoreton dum 4 horoj aŭ unu polvosuĉilon dum 2 horoj aŭ unu ventolilon dum 21 horoj. La laborpovo de unu kilovathoro funkciigos al ni kudromaŝinon dum 20 horoj, ebligos 30 foje veturi per lifto en la kvaran etaĝon aŭ varmigis 365foje krispilon de frizisto. Ĝi do estas unuo de elektra laborpovo sufiĉe intensa.

Inĝ. B. Molnár.

NOVA EŬROPO

LA VIRINOJ EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

Verkis Františka Plamínková. El la ĉeĥa manuskripto tradukis Marie Cimrová.

(Daŭrigo)

EDUKADO DE VIRINOJ

La klerigado de virinoj estis dum aŭstria regado tre limigita. Kvankam la elementaj kaj burĝaj lernejoj estis de sama kvalito por knabinoj kaj knaboj, tamen la instruado en kelkaj lernofakoj (precipe matematikaj-teknikaj) estis por knabinoj iom pli malsupera. Sed la mezaj lernejoj por knabinoj, kiel preparejoj por studado en la universitato kaj teknika alta lernejo, estis sole kelkaj kaj ĉiuj privataj. Oni akceptadis la knabinojn en la ŝtatajn lernejojn por knaboj sole en limigita nombro, kvin procentojn el la tuta nombro. Al la knabinoj ne estis permesite studi en fakultato por juroscienco (fakultato de teologio, romkatolika, estas fermita por ili ĝis nun), en teknika altlernejo, en akademio de artoj kaj en supera lernejo agronomia. La filozofia fakultato estis por ili malfermita nur de la jaro 1897, la fakultato medicina de la jaro 1900. Ĉiuj tiuj limigoj estis dum respublika regado forigitaj; hodiaŭ estas por knabinoj malfermitaj ĉiuj lernejoj, ankaŭ tiuj ĝis nun sole por knaboj rezervitaj.

En Ĉeĥoslovaka respubliko estis pli grandigita la ebleco de edukado por virinoj ankaŭ en iliaj specialaj fakoj. Estis fonditaj novaj fakaj lernejoj, supera sociala lernejo, dujara supera lernejo ĝardenista (ambaŭ fonditaj kaj estritaj de virinoj) kaj lernejo por edukado de flegistinoj. La instruado en ŝtataj lernejoj por edukado de instruistinoj por infanaj aziloj (preparaj lernejoj), de instruistinoj por virinaj manlaboroj kaj hejma mastrumado, estis reorganizitaj kaj plilongigitaj de du al kvar semestroj.

Por la vasta publiko estis fonditaj multaj familiaj lernejoj, unu- kaj dujaraj, kaj fakaj industriaj lernejoj por knabinoj (kie oni lernas kudri vestojn, tolaĵojn aŭ ĉapelojn), lernejoj de kuirarto, kiuj estas plejparte subtenataj de la ŝtato, lernejoj resp. kursoj por patrinoj, por vartistinoj de infanoj kaj por servistinoj.

En la lasta tempo estis leĝe fonditaj devigaj kompletigaj lernejoj (kursoj) por ĉiuj knabinoj de 14-16. jaro, kiuj ne vizitas ian superan lernejon (ĝis nun devige vizitis tiajn lernejojn sole komerclernistinoj.) (Daŭr.)

ESPERANTA MOVADO

CENTRA KOMITATO

La Centra Komitato oficiale dankis la Bulgaran Esperantistan Societon pro ĝia preteco inviti kongreson en Sofia kaj pro ĝia disciplina rezigno post la decido de la C. K. okazigi la XVan en Wien. Projekto de futbalkana kunveno kaj antaŭkongreso estas nun studata en Sofia kun aprobo de la registaro.

La C. K. ricevis kaj komunikis al sia Kongresa Komisiono la nomojn de la loka organiza komitato en Wien. S-ro Oskar Zimmermann estas prezidanto kaj S-ro Franz Schade (Mollardgasse 55, Wien VI) ĉeforganizanto kaj ĝen. sekretario. La proponita dato estas 16-20 Aŭgusto 1924.

La prezidanto de la C. K. D-ro Privat veturis Parizon por diskuti kun Generalo Sebert, honora prezidanto de Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.), S-ro Chavet, fakestro de C. K. por internaj aferoj de la movado kaj Prof. Cart, prez. de la Akademio, diversajn problemojn de la nunjara agado, interalie pri eventuala teknika konferenco dum aprilo en Parizo, kie kunsidos la Komerca Komisiono de UEA.

La Fakestro de C. K. pri Juro kaj Financoj, S-ro Page Edinburg, ricevis de K. R. informon ke la Brita Asocio decidis pagi por niaj oficialaj institucioj ĉi-jaran kotizon de 30 funtoj sterlingaj, La Svisa Societo Fr. sv. 100 (4 f. st.) kaj la Ĉeĥoslovaka Asocio Kĉ 500 (3 f. st.)

ZAMENHOF-MONUMENTO

El la raporto de la Organiza komitato (hon. sekr. J. D. Applebaum, Liverpool, hon. kas. Wm. Page, Edinburg) prezentita en la XV. kongreso ni publikigas por informo de niaj legantoj:

La monumento estas starigota laŭ la projekto de la pola skulptisto Lubelski. La pretigo de la projekto kune kun fundamento kaj starigo sur la tombejo koston 220 ĝis 240 funtoj sterlingaj (35-40.000 Kĉ). Ĝis la kongreso kolektiĝis ĉ. 166 funtoj (ĉ. 25.000 Kĉ). La organiza komitato proponis sendi el Skotlando la graniton, kiu estas la plej bona kaj longedaŭra. Sur la kvar flankoj de la monumento oni intencas meti nomojn de la Naciaj Societoj esp., kiuj aĉetos por si tiun rajton, kies prezo estos ankoraŭ anoncita.

Kvankam oni povas kompreni, ke tiu ĉi lasta aranĝo celas havigi pli da mono, tamen la maniero ne estas tro digna por la esperantistaro nek tro honoriga por la ricevonto de la monumento. La monon por la monumento ni donu kiel signon de dankemo de ni ĉiuj, kies vivon Zamenhof faris pli feliĉa per sia verko, sed ni ne postulu por tio iun rekompencan en formo de orlittera surskribo. Monumento de la kara homo ne estu kvitancilo, eĉ ne propagandilo.

La kolektado de la helpmono okazas per helpo de kuponoj po 7-50 Kĉ. Ĉiu ĉeĥa klubo ricevis po

2 kuponkartoj (40 kuponoj) en suma valoro 300 Kĉ. La klubojn ni atentigas pri la Oficiala informilo de CAE (p. 11.) R. H.

ĈEĤOSLOVAKIA TERITORIO DE U. E. A.

„La Progreso“ promesas fariĝi la vera organo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Utilos do informadi per ĝi nian publikon pri la laboroj entreprenataj de UEA en nia respubliko, tiom gravaj kaj tamen ne ĉiam sufiĉe komprenataj.

La ĉeĥoslovakia teritorio, ekfunkciis en 1923 kiel la dektria en vico de la teritorioj. Tiam estis en Ĉeĥoslovakio 654 membroj kaj funkciis 39 delegitoj. La teritoria laboro estas plenumata de mi kiel de la ĉefdelegito kaj de mia anstataŭanto sro Johann Klinger, Bodenbach. La laboro estas jam de la komenco sufiĉe ampleksa: Estas ĉe mi detala membrokontrolo, detala kontrolo de la delegitoj, konstanta provizo de ĉiuj eldonaĵoj de UEA. — Jen kio povas rimarkinde plifaciligi kaj precipe plirapidigi la administran procedon, ĉar la delegitoj kaj ĉiu membro en nia teritorio loĝantaj ne bezonas sin turni kun ĉiu sia deziro al la Centra Oficejo en Genève: ili ja povas ĉion ekscii aŭ mendi de mi. Tiamaniere ili ankaŭ ŝparos la diferencon inter afrankoj eksterlanda kaj enlanda kaj same la tempon, ĉar de Hradec Králové venos respondo pli frue ol el Genève, jam pro la geografia situacio de ambaŭ urboj. Kaj mi povas min disponigi al ĉiu pli, ol tion povas fari la Centra Oficejo zorganta pri la tuta mondo.

Estas du ĉefaj celoj de la teritoria aranĝo: Kiel eble plej trafe aplikadi la servojn de UEA en nia teritorio kaj kiel eble plej multe plifaciligadi la administradon de la Centra Oficejo en Genève. — Por baldaŭ veni al tiuj ĉi celoj mi bezonas plenan fidon de niaj delegitoj kaj amikan helpon de ĉiu vera UEA-ano. La funkcio de la ĉefdelegito estu konsiderata kiel pure labora!

— Estis dissendita „Oficiala Bulteno“ nro 9-a, baldaŭ venos la 10-a kaj kun ĝi la tempo de varbado kaj revarbado. Delegitoj preparu vin serioze por tiu grava laboro, zorge legante la bultenojn kaj la Oficialan Informilon en „Esperanto“. Varbu ne nur novajn adeptojn, sed revarbu ĉiujn malnovajn! Nia UEA estos des pli forta kaj utila, ju pli da membroj ĝi havos!

— Ĉiu delegito kontrolu tuj la tekston pri sia loko en la jarlibro 1923 kaj sendu al mi la necesajn korektojn aŭ ev. kompletigojn. Estas dezirinde, ke apud ĉiu ĉeĥoslovakia loko en jarlibro 1924 aperu telegrafstila informo kaj nombro de loĝantoj. Estas projektata grava eksperimento de energia varbado de komercaj anoncontoj por la jarlibro 1924. Por tiu celo mi bezonas alsendon de adresoj de firmoj, kiuj povas interesiĝi pri nia internacia reklamservo. Ĉiu delegito, ĉiu helpema samideano sendu ilin al mi; kiu emus kaj volus kunlabori persone varbante, skribu al mi kaj mi sendos la necesan materialon.

— Estas restarigita la antaŭmilita informa servo per gvidfolioj. Jus aperis modela, kvarpaĝa gvidfolio Bratislava, eldonita de la Porfremdula asocio (Slovenský cudzinecký sváz) en Bratislava, sub aŭspicioj de UEA. — Ni danku al nia delegito en Bratislava sro Dro St. Kamaryt por lia bonega laboro kaj imitu lian ekzemplon! La necesajn informojn pri la eldono kaj disvastigo de gvidfolioj mi liveros al ĉiu interesanto. —


Hradec Králové, la 19-an de novembro 1923
O. Sklenčka, ĉefdelegito de UEA.

**ĈEĤOSLOVAKA MINISTERIO
DE INSTRUADO KAJ ESPERANTO**

(Daŭrigo.)

Va Per dekreto de la 22./V. 1923 no 46455/I (4./VI. 1923 no III.-A 831/8-50120 de la landa lerneja konsilantaro) kaj 16./X. 1923 no 10259-VI de la lernejestraro de Praha estis permesite je speciala petskribo por la lernojaro 1923-24 senpaga instruado de esperanto en unu kurso (1 leciono semajne) ĉe

- Ot. Leneška, direktoro de la komerca akademio (31./X. 1920 no 58867 i. m.)
VIII. Aprobataj lernolibroj de esperanto, por:
- a) duagradaĵ kaj burĝaj lernejoj:
 - 1. Julie Šupichová, faka instruistino (30./X. 1921 no 90497 i. m.) kaj
 - 2. Josef Šusser, profesoro (26./VII. 1921 no 67262 i. m.) kaj
 - b) duagradaĵ lernejoj:
 - 1. Dr. Adolf Bischitzky, kuracisto (28./XI. 1922 no 129873 i. m.) (Daŭr.)
 - A. Pitlík.



Brunner: La kvin sentoj

la knabina burĝa lernejo en Praha VII. „U Studánky“. Partopreni estas permesite al la knabinoj, kies rezultato en la ĉeĥa lingvo estas tre bona kaj kiu ne estas tre okupitaj per lernado de aliaj nedevigaj objektoj.

Vb Esperanta instruado permesita en la burĝa lernejo en Karlovy Vary (Carlsbad) per dekreto de la 3./XI. 1921 no 104248 min. instr. (21./XI. 1921 no 1A 2954-106920 Landa lerneja konsil.)

Vc La lerneja konsilantaro por Bohemio aperigis la 19./II. 1923 dekreton 1A 435/16609, per kiu oni permesas de okazo al okazo esper. instruadon en germanaj lernejoj.

VI. Al Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakujo estas permesite per dekr. de la 8./VII. 1921 no 48851, komunikita de la landa lerneja konsilantaro en Praha la 27./VII. 1921 no 1B 718/1 69003 aranĝi dum vakanco kurson por estontaj instruistoj de esperanto ĉe burĝaj lernejoj.

VII. Ekzamenaj komisaroj de esperanto estis nomitaj ĉe la Ekzamenaj komisionoj por popolaj kaj burĝaj lernejoj en:

Praha: Jos. Eiselt, eksgimnaziestro (dekreto de la 30./10. 1920 no 67780 i. m.) kaj

Dro. Ad. Bischitzky, kuracisto (30./X. 1920 no 68477 i. m.)

Brno: Inĝ. V. Kroužil, profesoro (27./X. 1920 no 67190 i. m.) kaj

DRO ALEKSANDRO GIESSWEIN

